3.ª JARO N.º 31 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 1 FEBRUARO 1938

# Popola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA VALENCIA (Hispanio)
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25

## NEŬTRALISMO SEN NEŬTRALECO

Anakreon Stamatiadis, krom gvidanto de la Esperanto-movado en Grekio, estas mistika adepto de tiu stranga neŭtralismo, kiu mirinde kongruas kun respekto por la lukso k ignoro por la mizero. Tiu eminenta doktoro ĵus skribis al ni koncizan leteron, laŭ tre korekta stilo, petante, ke ni ne plu liveru nian gazeton al li, nek al ceteraj grekaj adresoj, por la bono de Esperanto k por la sendanĝereco de la helenaj esperantistoj.

Ni ne scias, kian pekon ni trafis por ricevi tiel rigoran ekskomunikon de la ortodoksa patriarko de la neŭtrala esperantismo. Nia modesta revuo ne estas triviala pamfleto pri politikaj skandaloj. Nia celo estas pli pura k sindonema. Eble en tio kuŝas nia delikto kontraŭ la dogmoj de falsa neŭtralismo. POPOLA FRONTO estas voĉo de simpla popolo, kiu armite batalas kontraŭ ribelo de kapitalistoj, generaloj k episkopoj ĉar, en Hispanio, okazas la brulanta paradokso, ke la popolo ludas konservativan rolon defendante, ĉirkaŭ sia legitima Registaro, la ordon, la leĝon, la kulturon, la flagon, la ŝtaton – k eĉ Esperanton!—inter multaj aliaj etikaj atributoj, kiujn celis detrui per strata tumulto unue, per reakcia revolucio poste k per abomena milito finfine, kapitalistoj sen konscienco, generaloj sen honoro k dikaj episkopoj sen moralo nek religio.

En la kofro de niaj rememoroj, ni gardas kuriozajn temojn pri tiuj *samideanoj*, kiuj malŝate grimacas se Esperanto ĝentile taŭgas por praktikaj aferoj de la humiluloj, k tuj senbridiĝas la ĝojajn sonorilojn kiam, en diktatora lando, aperas turisma prospekteto en nia lingvo. *Sendependaj* trumpetoj informas, kvazaŭ pri la plej grandioza triumfo, kiam la kaprico de Hitler ne malpermesas la uzon de la verda stelo. Apoteoze blovas la flutoj de *senpartiaj* kolegoj, kiam Mussolini, sklaviganto de Italio, profananto de Abisenio k murdanto de Hispanio, ofendas la spiriton k la internan ideon de Esperanto, aplikante ĝin en radio-disaŭdigoj por propagande pravigi sian tiranion, vuali siajn sakrilegiojn k maskadi siajn krimojn.

La lertaj disĉiploj el Oriento ankaŭ tordas hokokruce la pintojn de nia emblemo. Jam aperas en Japanio esperantista bulteno, kiu sarkasme pretendas pruvi, ke la ĉinoj invadas Ĉinion!... Dank' al Esperanto jam ekzistas ekvilibro. Favoraj recenzoj jam povas laŭdi la virtojn de ambaŭflankeco...

En tiu ĥoro, ni ne kantas! La verda stelo, ĉe nia jako, ne hontas. La internacia lingvo tra niaj paĝoj ne suferas. La Zamenhofa idealo, la strofoj de «La Espero» k la varmaj aspiroj de grandega plimulto el la tuta esperantistaro—malgraŭ la greka doktoro—plene koincidas kun sopiroj pri la sankta Libereco, kies esencon ni defendas k servas redaktante k ekspedante ĉi tiun esperantaĵon, kiun sinjoro Anakreon Stamatiadis konsideras malutila por Grekio, antikva lando de saĝuloj k artistoj, lulilo de filozofio k lernejo de heroaj civitanoj. Feliĉe, la Grekio de doktoro Stamatiadis ne estas la klasika Helenio de la reĝo Leonidas...

## SUB IMPRESO DE BOMBARDADO

Nova fazo, plej kruela, regas en nia milito. Ĉefaj urboj k modestaj vilaĝoj de Hispanio travivas terurajn aerajn bombardadojn! Plurfoje, dum sama tago, avertas pri danĝero la fajfilegoj. Zumas, tra la lanugoj el nuboj, la faŝistaj motoroj. Siblas funebre falinte la bomboj. Krevas eksplode la ŝarĝo de trilito. Krakas la kristaloj k tremas la muroj de tuta kvartalo. Tuj forflugas la aeraj piratoj. Kiel abomenaj postsignoj de ilia vizito, restas kelkaj domoj renversitaj k multaj homaj korpoj disŝiritaj. Ŝtonoj k rubo knediĝas kun sango; pecoj de vive tremetanta karno naŭze algluiĝas sur najbarajn fasadojn... Ĝemoj k veadoj de vunditoj—infanoj, virinoj, maljunuloj—kompletigas la scenon, antaŭ kies drasteco ŝajnas palaj la plej krudaj bildoj de la Infero, kiun la mezepoka fantazio de Dante priskribis...

Tiamaniere la Faŝismo montras sian rabion pro nia venko de Teruel. La indiĝenaj vasaloj de la internacia despotismo, spertante malvenkojn en la frontoj, organizas krimojn en la ariergardo, sur civila loĝantaro, kiu ne kapablas nek povas sin defendi. Franko, tragika pupo, havigas la arenon de sia lando al la italaj k germanaj aviadistoj, kiuj rafinite ekzercas la instruojn de Ludendorff pri tuteca militado. La cinika enhavo de fama libro de Vittorio Mussolini—kiu sentis volupton observante la detruon, kiun kaŭzis liaj bomboj sur mizeraj abiseniaj kabanoj—ricevas nun plian konfirmon en ĉiuj hispanaj urboj kuŝantaj, ĝracie k pace, laŭlonge de la Mediteranea bordo.

La eksterlandaj delegacioj povas jam, sen troa emfazo, konstati propraokule la dimensiojn de nia tragedio. Ne temas pri politika agitado nek pri oficiala propagando. Temas nur pri faktaj k frenezaj konvulsioj de tradicia monstro, kiu kvitancas furioze la trafajn batojn de kuraĝa popolo. Niaj klaraj venkoj havas kruelajn respondojn; kvazaŭ nur tio rajtus gajni... Jen senprecedenca karaktero de la fia imperialismo en nia epoko; kvankam multaj personoj ankoraŭ ne konscias pri la minaco! En Parizo k Londono, ankoraŭ tro multaj oreloj estas surdaj al tremskuoj de obusoj k eksplodiloj en Hispanio. Ĉu ili ne scias, ke tio estas anonco pri sama spektaklo, okazonta iame, sur ajna urbo de alia lando, se la respondecaj institucioj ne baras nun la vojon al la drako? Tiun taskon ni jam plenumas! Nia Armeo jam ekgustumis la venkon. Ni marŝas antaŭen por liberigi, je la bruna pesto, eĉ lastan angulon de nia teritorio. Se la liberala mondo helpas nin aktive, ni liberigos ĝin pli frue. Se la demokratoj falas en abismon de perfida honto rigardi pasive nian lukton, ni ankaŭ ilin liberigos. Sed tiuokaze, la malkuraĝuloj ŝuldos sian liberecon al la sango, kiun malavare elverŝis nia popolo.

Fidante je la kancelaria indiferenteco, la Faŝismo bombardas nun rabie lernejojn k hospitalojn, detruante la plej belajn urbojn kun monumentoj k historiaj konstruaĵoj. La hieno celas per tio rompi la obstinon de nia konvinko. Sed ĝi eraras profunde, ĉar hodiaŭ eĉ la iamaj hezitemuloj fermas kolere siajn pugnojn. Antaŭ la malnoblaj faroj, nia ariergardo reagas kun senbrida entuziasmo. Ŝrapneloj k bomboj semas doloron, sed ili ne malstreĉas la heroajn kordojn de tiuj, kiuj devas batali plenumante devon. La Respubliko ŝovelas siajn ruinojn k enterigas siajn mortintojn. Oni priploras ilin en silento, oni ĵuras ilin venĝi k oni tuj rekomencas la taskojn, kiujn la bomboj interrompis. Neniu hezitas, ĉar ĉiu civitano de la Respubliko, mobilizinte sin por la nobla krozado estingi la mikrobojn de faŝista epidemio, volonte hipotekis sian propran vivon por asekuri ĉies pacon k feliĉon.

Antaŭ tiel alta celo, nia vivo ne multe valoras. Per nia sufero, ni konkeros la bonstaton de la proletaro. Ni atingos definitivan punon por la feŭdaj kastoj ĵetintaj nin en militon, kiun ni ne provokis, kiun ni ne deziris nek volis nek ŝatis, kvankam, malgraŭ tio, ni devas ĝin rigore elteni ĝis la impona ekstremo trudita de tiuj kanajloj, kiuj, tra lanugoj el nuboj, murdas k ŝiras civilajn korpojn kun tiel malhumana instinkto, pri kies ekzisto neniel oni povus suspekti en estaĵoj naskiĝintaj el ventro de virino.

NIAJ VIRINOJ

## Mercedes Maestre

Mercedes Maestre estas juna kuracistino, loĝanta en Valencio, kiu, ekde la momento, kiam ŝi komencis ekzerci la profesion, montris sian kompatemon al la suferantoj, ĉu pro fizika doloro ĉu pro persekutado okaze de politikaj aŭ socialaj luktoj. Tre baldaŭ ŝi men enmiksiĝis en la ondaro de la proletara batalado kontraŭ la subpremantoj k ŝi—kiu dekomence praktikadis solidaron per flegoj k zorgoj senpagaj al la filoj de la laboristoj; ŝi, kies hejmo k monujo estis ĉiam pretaj k malfermaj al la bezonoj de la ekspluatatoj—elportis siavice, kelkfoje, karceron k persekutadon.

Kiam eksplodis la faŝista ribelo, Mercedes Maestre malavare sin fordonis al la defendo de la Respubliko, kiu uzis ŝiajn servojn plurloke. Ŝi estis vicsekretariino kun la anarkista Ministro k-dino. Frederika Montseny k poste okupis sin akurate k sindone en diversaj laboroj utilaj, helpe de malsanuloj k vunditoj.

Lastatempe, Mercedes Maestre deĵoris en Saniga Servo por sangotransfluo, kie ŝi plenkonscie k entuziasme laboregis senlace, penante plenumi devon, kiu plene akordiĝas kun la sentoj de ŝia koro.

La 4. Januaro, ŝi ekveturis per ambulanco al fronto de Teruel, kunportante vazojn kun sango por la vunditoj de la Popola Armeo. Terurega neĝotempesto estis baranta ŝoseojn k vojojn. Tre malproksime de la alvenloko, en forgesita vilaĝeto, la veturilo devis nepre halti, sen espero pri baldaŭa eblo iri pluen... Sed Mercedes Maestre ne hezitis eĉ momenton. Gloraj herooj, batalfratoj kun ŝiritaj karnoj pro la faŝista mitralo, kuŝis en mortdanĝero, atendante ŝin... Ŝi riskis ĉion, eĉ sian propran vivon, por savi tiujn de la suferantoj.

Du longajn tagojn, ŝi marŝis piede sur la densa neĝo, je temperaturo de dekkvin gradoj sub nulo. Kiam Mercedes Maestre atingis la hospitalon, ŝi trenis penige siajn piedojn en disŝiritaj ŝuoj, ŝia korpo estis glacia, la haŭto iĝis nigreca. Ŝi estis tute laca, sed tamen, el ŝiaj okuloj eliĝis brila rigardo, montrante ŝian intiman ĝojon.

La izolaj vojoj, la vasta horizonto —neĝa pejzaĝo sen arboj nek birdoj— estis akompanintaj ŝin en ŝia abnegacia aventuro... La sango alvenis akurate k ĝustatempe; kelkaj vunditoj, en malesperiga stato, sukcesis savi sin dank' al la sindono de tiu popolfronta sentema virino.

Mercedes Maestre estas tre modesta k aljuĝas nenian meriton al epizodo, rifuzante gratulojn. Sed ŝi ne povis eviti, ke la ĵurnaloj reliefigus ŝian heroan konduton aŭ ke la homoj, kiuj saviĝis per ŝia escepta sindonemo, benu ŝian nomon, En nia urbo, oni laŭde komentis la aferon, precipe simplaj gepopolanoj k esperantistoj en kies Laborista Grupo, ŝi lekciis antaŭ kvar jaroj pri higieno k eŭgeniko.

# Pozitiva laboro de la C. N. T.

En bela teatro de Valencio, dum kelkaj tagoj ĵus okazis, kun granda sukceso, Nacia Plenkunsido de la sindikata organizo C. N. T. La vasta salono prezentis, de mateno ĝis nokto, viglan aspekton de abelujo. 800 delegitoj de industriaj aŭ kamparanaj kolektiviĝoj k sindikatoj, apud la reprezentantoj, de lokaj, distriktaj k regionaj komitatoj, estis kvazaŭ rimenoj k motoroj de la kapabla potenco de la masive organizita hispana proletaro.

Kvankam tiu ĉi Plenkunsido estas afero de la C. N. T. oni povas agrable konstati, ke ĝiaj decidoj estas ankaŭ tre interesaj por la alia grandega duono de la laboristaro enkadrigita en la veteranaj vicoj de la U. G. T. La resumo de ĝiaj debatoj liveras gravan materialon, kun la celo anstataŭigi arkaikajn organojn per pozitivaj k modernaj metodoj. La hispana proletaro atingis jam sian maturecon, tra la suferoj k oferoj de kruelaj persekutoj. Ĝia socia plenaĝeco estas samtempe ĝia politika supereco. Tial estas utilaj k laŭdindaj la klopodoj, de la anarko-sindikatista movado, forlasi la negativajn flankojn de klasika eksterleĝa periodo, k studi la manieron apliki, kiel eble plej efike, la realon de multaj teorioj, sen la peza balasto de ĉio, kion la sperto deklaris nenecesa. Tiaj kondiĉoj kreskas en la ekonomiaj medioj mem, kiujn nun kontrolas k gvidas, en Hispanio, la laborista klaso. Ili etendiĝas flue ĝis la specialaj institucioj de intelektuloj k teknikistoj, apartigitaj de la amaso aŭ malamikoj de la amaso, ĝis nun. La finaj rezolucioj de la C. N. T. estas sekura paŝo por atingi socian venkon, detruante la rutinemon de mastroj k ekspluatantoj por la ĉifona mizero de ekspluatatoj.

La proleta klaso staras nur sur nova etapo! Tion deklaras emocie la ĵurnaloj de la C. N. T. Estas vere; jes, ĝi ne floras hazarde nek improvize, kvazaŭ unutaga rozo, ĝi science k serioze knedas cementon k masonas muron por kontrui la palacon de l' Progreso, kies terenon ni gajnas unue per la kuraĝo k disciplino de nia Popola Armeo sur la batalkampoj. La kaŝa konspirado malaperis por cedi lokon al la pozitiva diskutado. La C. N. T. ne malfruas profiti la bonajn ŝancojn de la novaj cirkonstancoj: Jen do la rezolucio pri teknikaj delegitoj! Jen ankaŭ la fondo de Sindikata Banko! Jen krome la bona laboro pri Sociaj Asekuroj k Industriaj Federacioj!



Tio ĉi estas nur kelkaj facetoj de nia Revolucio, kiun la hispana popolo akuŝas per la helpo de siaj politikaj partioj k sindikataj organizoj, sub la zorgo k protekto de la Popolfronta Registaro. La Sindikatoj estas do plej firmaj fundamentoj por la nova ekonomio!

## DU FINANCOJ

La vicsekretario de la Ministerio por Financoj de la Respubliko, diskonigis leteron, kiun sendis Andreo Moreno (unu el la ĉefaj monsubtenantoj de la frankistaj financoj) al la Komerca Banko de Habana:

«Kiam ni faris konvencion kun vi, por establi en Londono la konton «Banko de Komerco n.° 2», por kio vi tiel ĝentile donis al ni tiom da facilaĵoj, ni kredis ke la templimo ĝis la 31. Decembro 1937., kiun ni interkonsente fiksis, estus sufiĉe larĝa por ke ni povu labori normale, sen bezono tuŝi tiun konton.

Ĉar, bedaŭrinde, ne okazis tiel, ni estas devigataj petegi vin, se vi tion bonvolas, ke vi alsendu depeŝon al niaj korespondantoj, kun ordono, ke la kontrakto, subskribita per oficiala akto, estu prokrastata ĝis 31. Decembro 1938».

La ambasadoro de Hispanio en Londono konfirmis, ke la Registaro de la Respubliko pretigas la duan pagon de la sumoj ŝulditaj al Britio por la kreditoj konsentitaj, post apliko de la lasta akordo.

La financaj rondoj kalkulas, je 76.000 sterlangaj funtoj, la tuton de tiu pago k ili reehas la bonegan impreson, kaŭzita per la seriozeco de la hispana Registaro, alfrontante siajn ekonomiajn kompromisojn k pruvante tiel la solidecon de siaj financoj.

Tiuj du novaĵoj tute ne postulas komentarion, sed nur kontraston.

# ATESTO DE ANGLA DEPUTITO

**Antaŭ kelkaj tagoj, grupo de la anglaj laboristaj parlamentanoj, kiuj vizitas Hispanion, haltis en Madrido kiam sur la ĉefajn arlergardajn urbojn falegis faŝistaj bomboj. En Londono regis angoro pri la bonstato de la vizitantoj. La prezidanto de la Londona ĵurnalista Asocio vokis telefone al Madrido demandante sciigojn pri siaj kolegoj. La deputito Dowie mem donis respondon al la demandinto per jenaj oportunaj k riĉenhavaj vortoj:**

«Ni fartas bone. Ni suferas nenian vundon! Ni vojaĝas sub protekto de la Respubliko. Estas vere, ke la fremda aviadilaro, je la servo de Franko, vizitis nin tre proksime. La bilanco, kiel ĉiam, kalkulis kelke da viktimoj el la civila loĝantaro. Pliaj virinoj k buboj murditaj de Hitler k Mussolini, kun la aprobo de la angla k franca Demokratioj.

Per niaj propraj okuloj, ni konstatis pri la fruktoj de la Ne-Interveno! Ni petas vin ne aldoni nek demeti eĉ komon al tio, kion mi nun deklaras. La tuta Londona gazetaro devas ĝin disvastigi. Ni hontas je nia Registaro, kiel reprezentantoj de la tradicia noblanimeco k *fair play* de la plimulto el la demokrata-brita popolo. Ni mem vidis kiel la Respubliko traktas la faŝistajn kaptitojn: Kun humaneco, respekto k noblanimeco vere hispanaj!»

# KUN ANTIFAŜISTA RESPEKTO

Dum la pasinta somero, ĉiuj episkopoj, dejorantaj en la faŝista zono de Hispanio, subskribis dokumenton, per kiu ili, forlasante la ĉielajn regionojn, pretendis tre mallerte pravigi la ribelon, de fiaj aristokratoj k generaloj—lakeoj de invadintaj ŝtatoj—kontraŭ la normala leĝo de legitima Registaro. La subskriboj de piaj sinjoroj sigelis stultajn argumentojn, kiuj estis plej rekta atako kontraŭ la naŭa fundamenta ordono de la kristana religio. Unu el tiuj sanktaj personoj, kiuj benis k aprobis la celojn sklavigi la popolon, estas do la episkopo de Teruel; tiutempe, kompreneble, Teruel pompis kiel perversa paradizo, kie lukso k mizero mezuris decajn distancojn, ĝis kiam la Popola Armeo jam renversis la sistemon, per brava rekonkero de la urbo. La episkopo ne havis tempon forkuri; la «ruĝaj hordoj» kaptis lin sen difekto por lia persono nek profanado por lia mitro. La somera ofendinto transformiĝis subite en vintra flatanto. Kvankam la popolo, por plenumi sian devon—defendi la liberon!—ne atentas jam ofendojn nek flatojn. La faŝista prelato estas nun kaptito atendanta juĝon de regula tribunalo. Lia speciala rango vekas intereson pri la maniero procesi ĉefan sacerdoton, kiu malŝatis la ĉifonojn de mizerulo por profiti la purpuron de riĉulo. En mezo de vigla koncerto de opinioj; maljuna, liberala k sentema ĵurnalisto, tra la paragrafoj de inspirita artikolo, proponas proksimume jenon: La plej modela ekzemplo, por puni la malpiajn farojn de la diocezestro, estus diplomata demando al la Papo, por konkreta deklaro, ĉu li aprobas aŭ malaprobas oficiale la konduton de sia reprezentanto. Se la papa respondo estas malaproba, la episkopo estu laŭrite degradita k kondamnita kiel ordinara civitano, sen favoro nek venĝo. Neniu povus plendi pri la justa normo! Se la Papo hazarde aprobas la pasintajn agojn de la prelato, oni liberigu lin tuj senkondiĉe, sed proklamante samtempe, ke post tio la leĝo funkcios senbare, kontraŭ murdistoj k provokistoj, sen atento al. ies klerika grado, ĉar tiukaze la Eklezio ne jam plu estus neŭtrala spirita institucio. Kaj se la Vatikano silentas, aŭ la respondo estas intence malklara, tiam neniu honesta katoliko aŭ sincera kristano, en Hispanio, rajtus suspekti pri la sinteno de la Respubliko al unu eklezio, tiel ekstreme forgesinta la doktrinon k purajn principojn de tiu bonanima homo, aŭ mistika profeto, kiu estis nomata Kristo...

Kun antifaŝista respekto, la leĝo restus sata k la konscienco trankvila! Kaj la hipokriteco sen efiko!

# AŬSKULTU, PATRINO...

Kelkfoje vi diris: —Filo, vi libertempas, serĉu por vi amuzon, dancu k kantu kune kun la knabinoj!

Sed aŭskultu, patrino: Iun tagon mi estis apud Jozefo, en la tranĉeo. Ni kantis gaje. Subite tondris bruo; el la nobla frunto de Jozefo ekfluis sango. Lia vivo ĉesis...

Aŭskultu patrino refoje: Alian tagon, estis mardo, ni dejoris en *. Sur la strato ludis infanoj, k mi kun ili. Perfide venis la faŝistaj aviadiloj, krudaj k brutalaj, kun bruego de bomboj eksplodantaj... Ŝprucis la sango. Multe da infanoj ĉarmaj bubetoj, mortis!

Tial, kara patrino, mi ne volas danci. Mi parolis kun virino, kiu venis al ni, el faŝista distrikto, kun tri buboj. La edzo sekrete fuĝis. Ŝi rakontas:

—Kie li estas?—demandis al mi falangisto svingante revolveron, antaŭ mia brusto—Diru tion, aŭ mi nepre mortpafos vin; mi donas al vi tempon ĝis morgaŭ!—Poste, la fripono foriris k ŝlosis la pordon. Mi diris nenion; la infanoj ploris, sed ni ĉiuj forkuris saltante, tra la fenestro, en la malluman kampon.

Aŭskultu ankoraŭ, patrino: Mi aŭdas k reaŭdas, ke la riĉa najbaro Petro flustras: —Sufiĉe da sango, sufiĉe da oferoj, oni devas aranĝi kompromison!—krome, mi aŭdis, ke li ankoraŭ neniam estis sur la batalkampo.

Jes; aŭskultu patrino: Certe mi ne emas morti... Sed fari kompromison kun tiaj krimuloj; pardoni al ili abomenajn murdojn, bombardojn, terorojn. Neniam patrino!

Mortigitaj infanoj, forpelitaj maljunuloj, detruitaj domoj de Madrido k dezertigitaj kampoj de tuta Hispanio donas la respondon: —Neniam!

Tiu kompromiso estus nur efemera paco por kelkaj monatoj. Poste, denove la milito flagrus kun pli furioza karaktero. Ne, patrino, ni ne volas tion! Ni marŝas nun jam sur la vojo de la venko. Hodiaŭ ni posedas Armeon, armilojn k simpation. Ni venkos k certe nur nia venko estos garantio por la paco. Kaj tiam, amata patrino, mi kantos plenvoĉe k dancos kun ĝojo!

El la murgazeto de la 2.° Bataliono de la Brigado *Garibaldi*, represis k tradukis

Johann CHRISTAMENTL

Internacia Brigadano

**Esperanto, defendante la liberon, trafas sian plej efikan propagandon!**

# LA MONDO EN ANGORO

Kiam Italio forlasis la Ligon de Nacioj, fluadis abunde la inko pro multaj artikoloj. Kaj oni sin demandas pri la kialo, ĉar la okazintaĵo ne estas tiel grava. Kun Italio aŭ sen Italio, la Ligo de Nacioj daŭras tiel, kiel ĝi estas: Organizo al kiu neniu fidas. Institucio, kiu ne povas plenumi la taskojn por kiuj oni ĝin kreis! Jen do la malsano, kiun la mondo suferas; malsano kies kaŭzo estas simpla, kies danĝero estas granda. Multe pli granda ol supozas la simplanimeco de la nuntempa opinio.

Oni ŝatas diskuti, pri la Ligo de Nacioj, kvazaŭ pri nova metodo, kiu ne rikoltis sukceson pro siaj tro aŭdacaj novaĵoj, kies fiasko, tial, ne devas naski surprizojn hek alarmojn. Kiam homa klopodo triumfis jam en sia unua ekpaso? Rigardante tiamaniere la fiaskon de la Ligo de Nacioj, ĝi aperas nur kiel unua sperto, kies eduka efiko dependas de nia obstino. Tamen, la Ligo de Nacioj venis kiel frukto de plej grava k plej solena traktato de la Historio; sekve, ĝia putriĝo signifas, ke tiu plej solena k plej grava traktato ne estis dece respektata. Laŭ tio, la fiasko de la Ligo de Nacioj estas absolute universala fiasko. Ni penu do kompreni k dedukti objektive la konsekvencojn:

Ĉe la fino de la Granda Milito, pli ol kvindek ŝtatoj—preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo—fondis k aliĝis la Ligon de Nacioj. Tio signifas jure, ke ili subskribis dokumenton, per kiu ĉiuj sin devigis vivi inter paco k harmonio; kun formala promeso defendi ĉiun landon atakitan de alia ŝtato, membro aŭ nemembro de la Societo.

Sed, kio okazis? Tiu solena k grava traktato estas ĉifita, ekde la jaro 1931.[a], de du potencoj: Unue de Japanio, kiu en 1931. invadis Ĉinion k poste de Italio, kiu en 1935. invadis Abisenion k en 1936. Hispanion. En ambaŭ kazoj, la traktato ne funkciis. La subskribintaj ŝtatoj ne sciis, aŭ ne volis havigi tuj, al la viktimoj de la ofendo, la helpon, kiun ili rajtis ricevi. Dum ĝena dilemo, aŭ oni faris nenion, kiel en la afero de Ĉinio, aŭ se oni intencis fari ion per apliko de sankcioj, kiel en la afero de Abisenio, oni plenumis tion, tiel milde k malfervore ke la provo plene fiaskis. Tia estas la nuda vero! kiel natura sekvo, kreskis profunda pesimismo sur la tuta mondo pro terura angoro, kiu, precipe ekde 1936, minace vagas tra ĉiuj popoloj kiel aŭguro de ruino k morto.

Kia fido povas ekzisti, pri la efiko de traktatoj, se la plej solena ŝtono, kiu sajnis fundamenta por ĉiuj postaj akordoj, estas nur moviĝema sablo kiam du despotoj blufe ekzercas siajn armeojn antaŭ la timigitaj okuloj de la pasiva mondo? La pasiveco de la Ligo de Nacioj, antaŭ la profanado de la leĝo, estas certe komenco por la plej terura ĥaoso. Antaŭ ol la Granda Milito, la internacia ordo estis asekurita pro ĉies respekto al formalaj reguloj, k tiu respekto mem estis asekurita pro la normala ekvilibro de Eŭropo k Azio. Tiu ekvilibro malaperis. La Ligo de Nacioj celis restarigi ĝin. Sed nun, kiam la traktatoj estas nur ĉifitaj paperoj, restas jam, sur la mondo, nenia garantio k regas denove ĝenerala ĥaoso inter angoro k timo de multaj popoloj.

Ĉi tiu konsidero estas multe pli grava, se oni studas la malfacilajn rimedojn por solvi la situacion. Necesaj mildigi la angoron k forviŝi la pesimismon, kiu nun pezas en preskaŭ ĉiuj landoj, kiel minaco de historia katastrofo. La Juro k la Paco venkos finfine, nur se oni pruvas praktike al la tiranoj, ke rikano al la subskriboj k barbara apliko de forto estas ankoraŭ sporto tro danĝera por ili k tre facile evitebla de ĉiuj demokrataj popoloj, kiuj tiucele estas pretaj eluzi la necesajn rimedojn, por puni la provokintojn, interne aŭ ekstere de la Ligo de Nacioj. Se la provokoj ne ricevas punon, la aktuala angoro estos definitiva agonio de socia progreso.




La ŝtonego pezas tro multe sur la tegmento!

---

### POR LA HISTORIO DE UNU TRIANGULO

## FORGESITAJ DATOJ

Hitler k Mussolini subskribis aliancon kun Japanio, kontraŭ la komunismo. Sed, kiam la diktatoroj «malkovris» la komunistan danĝeron? Kelkaj datoj memorigos oportune k trafe la aferon:

1. Februaro 1933.—Hitler kaptas la regpovon.

21. Marto 1933.—Hitler deklaras en la Parlamento, ke li decidis subteni bonajn rilatojn kun la U. S. S. R.

5. Majo 1933.—Hitler renovigas, kun Sovetio, la traktaton, kiu finiĝis en 1931. k kiun ne kuraĝis renovigi la antaŭaj registaroj. Ĝi validas ĝis Majo 1938.

Junio 1933.—La vickanceliero Hugenberg estas eksigata ĉar li adoptis en Londono sintenon, kontraŭa al Sovetio.

10. Oktobro 1933. — Oficiala deklaro de Berlino asertas «ke la rilatoj inter la du landoj ne estos ŝanĝitaj pro diferenco de la politikaj reĝimoj».

30. Januaro 1934. — Dum parolado, Hitler, diras ke li «akceptas la deziron de Stalin plifortigi la amikajn rilatojn inter la du landoj».

1. Februaro 1924.—Italio agnoskas jam oficiale la politikan reĝimon de Sovetio, kelkajn tagojn post Anglio k antaŭ ol Francio, kun diplomataj afablecoj.

16. Januaro 1931.—En Ĝenevo, dum kunsido de la Komitato de Studoj por Eŭropa Unuiĝo, Grandi petis, ke oni kunvoku Sovetion k Turkion. Tiu peto ne estis akceptata malgraŭ ke ĝi estis apogata de Italio k Germanio.

Aŭgusto 1931.-Oni subskribis komercan traktaton inter Italio k Sovetio.

3. Septembro 1933.—Mussolini subskribis traktaton kun Sovetio, kies 4.[a] artikolo tekstas: «Ĉiu subskribanto akceptas ne partopreni ian ajn, ekonomian aŭ politikan, blokon aŭ kombinon, direktata kontraŭ la alia subskribanto».

3. Decembro 1933.—Litvinov vizitas Italion. La oficiala deklaracio diras: «Estas konsiderata la ebleco plibonigi la ĝeneralan politikan situacion per la spirito de la amika pakto sovet-itala».

Sed... kiam franca ministro Borthou invitis Sovetion partopreni la sistemon pri kolektiva sekureco k kiam en 2. Majo 1935. estis subskribata la traktato sovet-franca, Hitler k Mussolini malkovris subite la bolŝevisman danĝeron.

Kaj por distri la atenton for de iliaj friponaj intencoj aperas sur la mondo bandita triangulo, kies punktoj kuŝas en la urboj de Berlino, Romo k Tokio.

BONHUMORA FENESTRO

# EN REMBURITA SEĜO DE KINEJO

Estas jam multenombro da filmoj celantaj rikolti laŭdojn por la koloniaj armeoj de imperialistaj ŝtatoj. Mencio de titoloj ne estas necesa; ĉiuj tiaj filmoj, kun ŝajnoj de distro, pravigas la invadojn k cinike pledas pri la supereco, intelekta k sentimentala, de eŭropanoj k amerikanoj—blanka raso—antaŭ la barbareco de azianoj k afrikanoj, balasto el koloraj rasoj.

Senescepte, en ĉia ajn el tiaspecaj kinematografaj produktaĵoj, oni konstatas tuj la saman intencon: starigi kontraston inter la konduto, nobla, kuraĝa k sindonema, de la metropolaj soldatoj, kun tiu de la koncernaj indiĝenoj, kiuj pere de kruelaj k malicaj rimedoj—solaj kvalitoj, kiujn ili ŝajne posedas—pretendas defendi la sendependecon de sia riĉa teritorio. En la filmo, la indiĝenoj ĉiam estas malŝatindaj k perfidaj... kvankam la reĝisoro neniam klarigas, ke la faroj, kiujn ili plenumas, estas plenrajta defendo kontraŭ invadintaj trudemuloj, kontraŭ organizitaj negocistoj, venantaj el malproksimaj k nekonataj nacioj por rabi k forpreni al ili iliajn naturajn riĉaĵojn k trezorojn el opio, kotono, petrolo, briliantoj k perloj. Jen la ĉefa motivo kaŝita malantaŭ la ekrano, kie sinsekvas stultaj aŭ absurdaj scenoj, pri romantikaj idilioj k gluiĝemaj kisoj, sub la milda luno aŭ varma suno de la tropikoj.

La reĝisoroj plene sukcesas en tio, ĉar ili elektas tre zorge la eŭropajn aŭ amerikajn rolulojn, kiuj, ornamitaj per amaso da bonaj kvalitoj—beleco, simpatio k talento—tuj kaptas la favoron de la simpla publiko, preta ĉiam koleri kontraŭ ies riproĉo pri la okuloj, movoj aŭ kismaniero de siaj ŝatataj aktoroj.

La aŭtoro k direktoro, lakeoj de la kapitalismo, prezentas samtempe la marokanojn, la hindojn k eĉ la ĉinojn, kiel verajn monstrojn k kruelajn demonojn. Ili aperas, kvazaŭ simbolo de perfido k abomeno, kun unu sola favora escepto por tiu indiĝeno-hundo, servutulo de la invadintaj fremduloj k vera perfidulo por siaj samlandanoj.

La kapitalista filmoarto multobligas sian propagandon, kun tiel kreskanta ritmo, ke eble baldaŭ, oni povos rigardi en kinejo emociajn scenojn, kie ĉarma «stelulo» ludos rolon de aŭdaca itala oficiro batalanta en Abisenio, favore al la Faŝismo, kontraŭ la sovaĝuloj, kiuj per fiaj rimedoj de sabotado k spionado—anstataŭ ol uzi lancon k ŝildon kontraŭ la tankoj k aviadiloj—pretendas malracie kontraŭstari la patriarkecon de Mussolini. Aŭ eble la sama aktoro, enkorpigante la figuron de brava germana aviadisto, ludos rolon de fluganta heroo, bombardante lernejon plenŝtopitan de infanoj, k ruinigante hospitalon de la Ruĝa Kruco ie ajn de hispana respublikana urbo.

Tamen, ni volas esti tute objektivaj, en nia filma kritiko, per mallaŭta konfeso, ke almenaŭ en Azio ekzistas unu lando, Japanio, kiu gajnis rajton de supera kategorio, por sia speciala aristokrata flaveco, per imito al ceteraj imperialismoj k rafiniteco de ekstermaj metodoj por civilizi Ĉinion, kiu paradokse estas ĝia samrasa k iame civilizinta lando.

Pro la ĝentila prudento k riverenca diplomatado de Usono—paradizo de la sepa arto—rilate tiun aferon pri kolonia konkurenco, inter la Mikado k onklo Samuelo, la hispana popolo, vigle batalanta por eviti la rangon de indiĝeneco, iomete sprite k ŝerce, demandas ĉu la gajaj maristoj k la impona ŝiparo taŭgas por io pli efika ol por pozi ŝablonajn filmojn pri belaj koketaj knabinoj sopire atendante, en ia haveno, la venon de la Usona Eskadro, k melankolie adiaŭante ĝin en kajo de la sama haveno... kiun, certe k bedaŭrinde, neniam plu vizitos la gracia ŝipeto «Panay» ĝentile droninta por konfirmi la majstrecon de la orientaj teknikistoj.



Fiero, por tuta Hispanio, estis la Universitata Urbo de Madrido, jam preskaŭ preta ekfunkcii kiam eksplodis la faŝista ribelo. La sovaĝaj hordoj de Franko, en sia marŝo al Madrido, haltis tie mem, kie okazis la plej furiozaj bataloj. La imponaj k belaj konstruaĵoj, kiujn montras la bildo, estas nun amasego da rubo, kiel sanktaj ruinoj de laboratorioj por scienco k aŭloj de kulturo, kiuj transformiĝis subite je citadeloj por la popola libero

KRONIKETO EL ARAGONA FRONTO

# BLONDA FLEGISTINO

La neĝo degelis. La stratoj surhavas tavoleton da mola koto kun ĉokolada koloro. Ĉiuj paŝoj de la soldatoj restas tre videblaj; la grandaj botoj, kun najloj, firme desegnas sian konturon sur la gluaĉa pasto. Kaj, kvazaŭ ludema infano estus ĵus paŝinta sur la samajn kavojn, etaj signoj de virina kalkanumo premas pli funden la koton, interne de la aliaj piedsignoj.

Fajfas la alarmiloj. Gracia korpo de iu bela blonda knabino direktas sin al rifuĝejo. La faŝistaj aviadiloj bruigas la spacon per la zumado de siaj motoroj. Ĉe la sojlo de kamparana dometo, osta maljunulo—klasika aragona tipo, kun tuko ĉirkaŭ la kapo k mallonga velura pantalono—rigardas supren, minacante per sia bastono. Li murmuras kolerete: —Ho, se ili kuraĝus malsuprenveni, mi batus ilin unu post alia...

En la rifuĝejo—kelo de Hospitalo—akomodiĝas vunditoj, kuracistoj k flegistinoj. Oni aŭdas la akrajn krakojn de la pafoj k la tondrajn eksplodojn de la bomboj. La vunditoj, iam bravaj soldatoj sen timo dum batalo, akceptas nun tre ŝate la protekton de la flegistinoj; unu el kiuj estas la blonda virineto saltetinta sur la koto. Delikata fraŭlino, kiu volonte k fervore forlasis la burĝajn komfortojn de usona ĉefurbo, por cikatrigi vundojn k kvietigi spiritojn, ĉar ŝi milde dorlotas la vunditojn per la ĉarma sukero de siaj karesaj vortoj.

En la militistaj hospitaloj ne mankas la malsanuloj, kiuj enamiĝas je siaj flegistinoj. Ili, eble, ne povas kompreni, ke ilia boneco estas tute natura eco, kun sola celo k ĉasta aspiro plenumi konscian devon. Vundito, kun blanka vindo ĉe la okuloj, dankeme k pasie susuras al ŝi: —Kiel afabla vi estas! Ĉu vi edziniĝus kun mi post mia kuraco? Ĉu vi konsentas?

—Ho, dankon!—ŝi respondas—Mi ne povas fari tion, ĉar mi bezonas restadi ĉi tie. Venos aliaj vunditoj, kiel vi, k mi ankaŭ devas ilin konsoli k flegi.

Kiom da similaj anonimaj sinoferoj floras sur la antifaŝista kampo, kie oni batalas por eviti batalojn...

La alarmo ĉesis. La silenton de la stratoj ŝiras denove la bruo de la vivo. Revenas la vunditoj al siaj litoj. Kuracistoj k flegistinoj okupas diligente siajn postenojn.

La aragona maljunulo, ankoraŭ ĉe la sojlo de sia kamparana domo, diras k rediras kun naiva ĝojo:

—Ili ne kuraĝis lukti kontraŭ mia bastono. Ili forkuris. Mi jam supozis, ke ili estas malkuraĝuloj!...




## MUMIOJ EN LA KVATERNARA KRIPTO

Sen ia tro granda embaraso, ni konfesas nian malsperton pri mumioj. Nur pro tio, jam delonge, ni ne diras eĉ unuvorton pri la kuriozaj fosilioj, kiuj simbole kunvenas, de tempo al tempo, en iu arkeologia muzeo de Londono. Kvankam, kiel dirite, nia kompetenteco pri paleontologio estas preskaŭ nula, nia respekto, al tiu supera scienco, estas sufiĉe larĝa por multe bedaŭri la malatenton, kiun suferas la faraona komitato. Tial ni kuraĝetas inviti la senlaborajn esploremulojn armi sin per balailoj k forviŝi la densajn araneaĵojn, kiuj ŝtopas la enirejon de la kripto. La hispanoj, tre okupataj en sia milito, ne povas partopreni en tiu brigado. Tio estas preferinde, ĉar ilia malsperto, aŭ kverelemo, povus doni okazon al tre ĉagrenaj eraroj, ke anstataŭ ol uzi balailon por ŝiri la araneaĵojn, ili obtuze rompus ĝin sur la ŝtoniĝintan kapon de pli ol unu specimena ekzemplero de la fama kvaternara kolekto '

# MIA TRIA VIZITO

Malrapide, sed firme, post senĉesaj sinoferoj, la nova k nekonkerebla Hispanio marŝas antaŭen. Jen la impreso, kiu trude kaptas la spiriton en mia tria vizito, al ĉi tiu kuraĝa k obstina lando.

Tavolo de fervora decidemo ŝajnas envolvi la loĝantaron!

Mi estis surprizita per la improvizokapablo de la Respubliko ĉiuaspekte. Ĝia Popola Armeo, la disciplino, la trankvilo, la ordo, la obeo al la Registaro estas virtoj, kiujn oni rimarkas ĉiuloke, kun forta disvolviĝo de la militindustrio k ĉiutage pli forta politika unueco.

La popoloj de Anglio, Ameriko k Francio devas gravuri bone en sian menson tiun veron: helpi la hispanan Respublikon estas, ne simpla afero de humaneco. Ni devas pensi, ke ni rigardas batalon, kiu donos al la internacia Faŝismo decidan frapon. Hispanio ja rajtas nian subtenon. Vidante tiujn urbojn martirigitajn per la bestaĉa agado de la aeroplanoj de Hitler k Mussolini, nia atento estas forte vokata per la heroa decido venki. En ĉiuj vilaĝoj k urboj de la lojala Hispanio, ni aŭdis la samajn vortojn: «Ni ne volas kompromisojn. La sola kondiĉo, kiun ni akceptas, estas platigi Franko-n!»

Mi pensas, ke multaj homoj havis la saman oportunecon, kiun mi havis, inter la tagoj 15. k 27. de Decembro, por trakuri Hispanion k vidi multon. Bill Rust k mi estas traveturintaj multajn vilaĝojn k urbojn de la lando, k ĉio, kion mi vidis k aŭdis, ŝajnus al mi neebla, antaŭ ol veni. Kiam Bill revenis el Hispanio, li diris en Londono: «Oni ne povas iri en Hispanion k esti plue la sama homo. Tiu vojaĝo ŝanĝas ĉiajn vidpunktojn k eĉ la propran vivon». Kiam mi renkontis lin en Barcelono, mi pravigis lin, mi diris al li: «Vi pravis. Mi ne restis en Hispanio longan tempon, sed sufiĉe por kompreni, ke viaj vortoj estis trafaj k tre oportunaj».

Mi nur bedaŭras, ke ne eblas al ĉiuj britaj demokratoj viziti Hispanion k vidi, propraokule, la servon, kiun la hispana popolo faris al la Demokratio k al la Paco. Mi estis en Albacete, kiam alvenis la sciigo pri la venko de Teruel. Jam de tempo, la veraj amikoj de Hispanio sentis malkuraĝon. Oni diris konfidence, ke Franko estis preta komenci grandan ofensivon en tri frontoj, kio havigus al li grandan venkon ĉe Kristnasko. En tiuj cirkonstancoj, elŝprucis la granda sukceso en Teruel. Tiu ofensivo havas similan signifon kiel Sedan, Waterloo k la decidigaj bataloj en la Okcidenta Fronto, dum la lasta mondmilito. Teruel ne havas nur militan gravecon, ne nur moralan efikon en la vicoj de la respublikanoj, sed ĝi gravas ankaŭ en la internacia sfero, kiel speguliĝas jam en la tutlandaj ĵurnaloj.

La indiferento k eĉ la malbonvolo, de certa gazetaro, ŝanĝiĝis per laŭdoj k admiroj. Nova popola Armeo naskiĝis; disciplinita Armeo, kiu posedas aviadilojn, tankojn k artilerion k, kune kun ĉio ĉi, la konscion de sia sankta pravo k morala forto, kion certe neniam posedos Franko nek Hitler nek Mussolini.

Harry POLLIT

# Etuleto

La kromnomo estas ĝusta por ĉi tiu hispana infaneto, lerta k sprita, loĝanta nun en Francio, sub la delikataj zorgoj de antifaŝista familio.

Li estas ĉies amiko, ĉar li havas kvin jarojn k ridemajn okulojn.

—Bonan tagon, «Etuleto»!

—Bonan tagon!

Kaj rigardante lin, oni pensas emocie: «kia bela verko estas infano ridetanta...» Neniel oni povas eviti la dezirojn karesadi lin, ŝovante la manon tra liaj haretoj aŭ ŝerce pinĉante liajn rozkolorajn vangetojn.

Tuj li rakontas historietojn, nature disradiante ĝojon, tute same kiel la majesta suno dissendas lumon.

Ne estas gajaj, tamen, la rakontoj pri kiuj babilas ĉi tiu infano de Madrido. Li parolas pri bomboj, pri domoj falegintaj, pri buboj mortintaj tenante ankoraŭ, ĉe maneto, guman pilkon aŭ kartonan ĉevaleton.

Sed li—tre bonfarta ĉi tie, kun afablaj gastigantoj, kiuj ofte regalas lin per bongusta kuko el pomoj—ne povas kaŝi la brilon de siaj nigraj okuloj k la plaĉan mienon de sia hela simpatia k ronda vizaĝeto.

Kvankam tikla rememoro obstine trudiĝas: Temas pri dolĉa kringo, kiun bakadis la amata panjo por celebri festotagojn. Rostita k varmeta kringo, kovrita de sukero subtila k blanka, kvazaŭ faruno. Kiel agrabla ĝi estis por la buŝo k por la stomako! Kiel milda ĝi estis ankaŭ por la pura animo de la knabeto! Ĉu eblas memori sen ia melankolio pri la sorĉaj horoj, kiam la ĝepatra hejmo k la orumita kringo transformis lin je la plej feliĉa princo saturita de kisoj k dorlotoj?

Kaj nun? Nu, bone! Nun ekzistas por li nova panjo k nova paĉjo, kun ampleksa petolema rondo de novaj fratetoj; krom tio, la dimanĉa kuko el pomoj k malnova, k tre komplezema, aŭtomobilo, kiu dum ekskursoj entenas pacience dekduon da infanoj, kiuj kantas k ridas, kvazaŭ invititoj en kamparana geedziĝofesto.

—Bonan tagon, «Etuleto»!

—Bonan tagon!

Kaj la nigraj okuloj brile k naive ridas. Estas vere: Kia bela, ho kia bela afero estas ĉiu infano, kiu senzorge k hele ridetas...

ONKLO

**Posedi la veron pri Hispanio ne estas multe, se tio ne utilas por detrui la mensogon!**

## LA FAŜISMO ESTAS... FAŜISMO!

Pruvante sian humanecon, la Ministro por Nacia Defendo sugestis, al la faŝista Stabo, pri la eblo reciproke rezigni je la sovaĝa rimedo bombardadi ariergardajn urbojn. Dumaniere respondis la malamiko. Parole k fakte. La parola respondo, per Radio-Salamanka, laŭ jena teksto: «Hispanio ne estas la urboj, la stratoj, la monumentoj nek la homoj. Hispanio konsistas nur el la ideoj kiuj svarmas ĉe la menso de Franko».

La fakta respondo, atestis laŭ jena enhavo: Du teruraj bombardadoj sur Barcelonon, je 5000 metroj, kun 200 mortintoj, inter ili 45 infanoj...

Kaj en la mondo, multaj personoj ankoraŭ heziteme neŭtralas!...

# MOZAIKO

● La filio de Banko de Hispanio en Algeciras liveris al itala kirasŝipo tri milionojn da pesetoj, laŭ arĝentaj moneroj. La komandanto de tiu ŝipo pagis tiujn monerojn per sama kvanto en biletoj de la Banko de Romo.

● Samtempe, kiam la aeraj banditoj pliigis siajn atakojn, la maraj piratoj aperis denove en la Mediteraneo, malgraŭ la decidoj de Nyon. La 11. Januaro, je 47 mejloj malproksime de Valencia haveno, la nederlanda ŝipo «Hannsah Holland» estis torpedata k dronigata. Ĝi transportis tritikon. Hispanaj fiŝkaptistoj savis la ŝipanaron.

● Juna maŭro, Ben Alí, kaptita en Teruel rakontas siajn travivaĵojn: «Mi laboris, kun aliaj samtribanoj, konstruante ŝoseon, proksime al Tanger. Oni instigis min iri al Ceuta por atingi pli facilan laboron, pli bone pagata. Alveninte al tiu urbo, la veturilo haltis antaŭ kazerno de hispanaj armeanoj. Vole nevole, oni enirigis min. Tie mi renkontis aliajn samsortanojn, ankaŭ maŭrajn. Vane mi frapis furioze la pordon de tia karcero. Oficiro minacis nin per pafilo, k finfine oni sendis nin batali en Hispanio». Tiamaniere oni rekrutigas la malfeliĉajn marokajn «volontulojn».

● La angla gazeto *Financial News* en sia numero de 10-1-938, raportas, ke ŝuldoj de Franko al Italio k Germanio atingas jenajn ciferojn: Al Italio, 3.876.250.000 frankoj, k al Germanio, 9.496.000.000 frankoj; entute 13.372.250.000 frankoj. En tiuj ciferoj, ne estas enkalkulitaj la miloj k miloj da tunoj de diversaj mineraloj k krudaĵoj liverataj. Ankaŭ ne estas enkalkulitaj la viktimoj de tiu monstra milito senkatenigita de lia ambicio k de la enlandaj k eksterlandaj kastoj, kiuj gvidas, kontrolas k subtenas lin.

### PIRATOJ EN BONA STATO

La akordo de Nyon kontraŭ la piratado en la Mediteraneo sukcesas brile, same kiel la progresoj de Londona komitato. Almenaŭ Britio povas fieri pri ties efiko. Antaŭ kelkaj tagoj, en Tarragona haveno la ŝipo *Phorbenes* estis bombardata; malgraŭ siaj tri grandaj k videblaj anglaj flagoj. Kvar maristoj mortis per bomboj, tri dronis pro la eksplodo k 22 estis vunditaj. Kelkajn tagojn pli poste, en haveno de Valencio, pro efiko de alia faŝista bombardado, mortis la kapitano de la angla ŝipo *Dover Abbey*. Se ni estus ironiistoj, ni gratulus S-ron. Eden. Nia registaro honorigis la mortintojn k subtenis ĉiujn elspezojn por la enterigoj. Kiel broĉo por tiu kolekto, «nekonata» submareno dronigis la ŝipon *Endivion* pereinte kune kun la ŝipanaro eĉ la sveda oficiala agento de la kontrolo.



Chamberlain

● La hispana Registaro batalas k laboras. La Registaro ĵus finaranĝis projekton de irigacio por eksterordinare grava kvanto da hektaroj k projekton por novaj ŝoseoj, speciale dediĉata al provincoj de la Valencia regiono, destinataj al transporto de oranĝoj, entute 1.302 kilometroj.

● La faŝistaj registaroj de Aŭstrio k Hungario, en la freneza orbito de la fama triangulo, ĵus agnoskis la reĝimon de Franko. Kia estas la opinio de la koncernaj popoloj pri tio?

## AVIZO

K-do. O. Kupperman sciigas, ke li estas devigata prokrasti sian propagandan vojaĝon, ĝis la dua duono de Marto. Li akceptas ĉiujn invitojn k baldaŭ li sin turnos al la invitintoj. Lia adreso dume estas,

K-do. O. KUPPERMAN
COMISARIA DE PROPAGANDA
Avenida 14 Abril 462, bis
BARCELONA (Hispanio)

### FINFINE!

Finfine, ni sukcesis akiri paperon, el meza kvalito, por kelkaj numeroj. La sama enhavo, en pli bona vesto, povas esti pli taŭga por la nobla tasko de niaj senlacaj amikoj internaciaj.

● Multaj forkurintoj el faŝista zono, petas paroli al siaj antaŭaj kunuloj. Per laŭtigiloj, preskaŭ ĉiuj diras samajn vortojn: «Kamaradoj, venu ĉi tien; ni estas zorgataj, kiel fratoj, k ĈIUJ ESTAS HISPANOJ!» Ili diras tion por nuligi la faŝistan aserton, ke niaj soldatoj estas rusoj k francoj. La popolamasoj en faŝista zono estas narkotikitaj, infektitaj k trompitaj per tiaj absurdaj mensogoj.

● La 17. Januaro estis elektata la nova urbestro de Teruel. Oni nomis kamaradon Angel Sanchez, socialisto, kiu povis oportune eskapi el la urbo. La faŝistoj serĉis lin insiste k ne povinte lin kapti, ili arestis lian edzinon k lian filinon. La du virinoj estis murdataj senkompate, pro la sola delikto esti familianinoj de socialisto.

● Laŭ angla gazeto, la propono, kiu eble sukcesos, en la komitato pri Ne-Interveno por starigi kontrolon, estas jena: «Ĉiu komisiono povos konsisti el prezidanto, du membroj neŭtralaj k du militistaj teknikistoj. La komisiono, kiu vizitos la faŝistan zonon, estos akompanata de franca k angla teknikistoj; k tiu, kiu vizitos respublikan zonon, de itala k germana teknikistoj.» Se tia propono sukcesus, nin vizitus «oficialaj spionoj».

● La mondo, kiu pasive observadas la konstantajn bombardadojn kontraŭ Valencio, Barcelono, k pluraj urboj de la lojala hispana zono, devus pensi prudente, ke post findetruo de niaj urboj k vilaĝoj, la internaciaj faŝistoj same celas detrui Londonon k Parizon. La egoistoj el eksterlando agus multe pli egoisme, pripensante tiun eblon, sendante taŭgan materialon.

## NEKROLOGO

En defendo de Madrido falis, fine de lastpasinta Aŭgusto, nia kamarado, estonia esperantisto

J. KLAMMER, 27-jaraĝa,

kiu daŭre kunbatalis en Estonio, ĉe la laborista Esperanto-Movado, k kiu alvenis Hispanion dum pasintjara printempo por albatali Faŝismon.

Kamarado! Ni atingos cian k nian komunan celon!

## ABONMANIERO

Nia gazeto ne havas fiksan abonprezon. Ĝi eldoniĝas nur per laŭvola individua monhelpo de sia legantaro. Ni elektis tiun sistemon ĉar tiel, ĉiu kroma sumeto de tiuj, kiuj povas pagi iomete plie, ebligas la ricevon de agrabla legaĵo al multaj, kiuj pro senlaboreco, aŭ aliaj kaŭzoj, ne povas pagi sian propran kotizon. Tial, se la enhavo k celo de la revuo estas por vi aprobinda k plaĉa, pagu vian liberan abonon al iu ajn el niaj internaciaj agentejoj:

ĜENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono
GUSTAVE FARENC
53, Rue Brise-Pain
Poŝĉekkonto 13944 Orleans
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

NEDERLANDA ADRESO
nur por mono de holandanoj
PETRO van der PLANK
Van Speijkstraat, 48-I
poŝĝiro 245542
AMSTERDAM W. Nederlando

BELGIO
K-DO M. DELFORGE
33, Rue de Heigne
Poŝtĝiro 199106
CHARLEROI

ANGLIO
K-DO O. MELTON
23 Fowler Str. Nechells
BIRMINGHAM 7

SVEDIO
ARBETAR ESPERANTISTEN
Barnhusgatan 8 ö. g. n. b.
Postĝiro n.° 53411
STOCKHOLM

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA
**POPOLA FRONTO — Mar, 25, Valencia (Hispanio)**

## POPOLFRONTA LETERUJO

E. D.—Valmiera.—Vian leteron ni bone ricevis k ankaŭ la anoncitajn r. k. La perditajn n-ojn. ni ree sendos laŭeble. Ni dankegas viajn gratulojn pro ĵusaj venkoj.

J. N. - den Haag.—Ni kore dankas k estimas vian gratulon. Ankaŭ ni ricevis vian senditajon Fratan saluton!

E. B.—Moskvo.—Ankaŭ ni dankas viajn bondezirojn k gratulojn. Nia lasta venko kreos novajn por la bono de tutmonda laboristaro. Akceptu koran saluton.

J. L.—Pouy.—Vian karton ni ricevis. Ree ni dankegas viajn klopodojn k notas vian deziron pri sendo de P. F. al nova abonanto. Ankaŭ ni notis vian monsendon, kiun ni kvitancos en oportuna rubriko. Poŝte ni respondas vian lastan leteron.

M. d'A.—Fraga.—Tutkore ni dankas vian monsendon kun abono al P. F. Ni sendos la gazeton al Palestino, laŭ via deziro

G. J. de V.—Zeist.—Vian karton ni ricevis notinte viajn indikojn. Ni estimas danke viajn vortojn k sendas kamaradan saluton.

N. K.—Helsinki.—Vian leteron ni ricevis same kiel la senditan gazeton, dankante viajn esprimojn k klopodojn. Vian deziron ni transsendas al koncerna organizo, kiu plenumos — ni esperas — vian peton. Ĉiujn n-ojn. ni sendis seninterrompe al vi; tamen ni ripetos la sendon de la mankantaj. Zorge ni legis viajn opiniojn; ni penas agi laŭ ĉies deziroj. Fratan saluton!

J. J. v. R.—Amsterdam.—Vian leteron ni ricevis; ĝia enhavo, kiun ni dankas, plikuraĝigas nin. Antaŭen!

T. E.—Mosjoen.—Viaj, letero, afiŝo, eltranĉaĵoj k insigno bone trafis nin. La sendon ni dankas, kiel ankaŭ vian helpemon. Eble ni eldonos propagandajn p. m. se iam ni povas tion fari. Domaĝe, ni ne havas sufiĉan tempon nek necesajn elementojn por aperigo de P. F. ĉiusemajne laŭ via deziro. Plej kamaradece ni salutas vin.

J. B.—Cartagena.—Ni bone ricevis viajn leteron k poŝĝiron. Estonte vi povas agi sammaniere, t e vi povas sendi al nia adreso kion vi deziros. Ni notis vian adresŝanĝon Laŭeble ni povas provizi al vi diversajn esperantaĵojn. Petu detale. Ni kore vin salutas popolfronte.

J. W.—Cleden Poher.—Via riĉenhava letero, plena je trafaj konsideroj, ĝustatempe trafis nin. Ni estimas vian sintenon k sincere deziras, ke vi daŭrigu la propagandon laŭ indikita aspekto. Ni notis vian adresŝanĝon k forte manpremas vin.

D. P.—Moskvo. Ni ricevis viajn leteron k libron. Laŭ via peto, ni publikigas la anonceton; k salutas vin plej amike.

G.—Nimes.—Vian leteron ni transdonis al k-do. kiu penos komplezi vian deziron. Se li sukcesas, vi ricevos rektan respondon. Tutkore ni sendas saluton.

H. B.—Pardaillan.—Viajn instrukciojn, rilate al sendado de P. F., ni notis. Ege ni bedaŭras ne povi komplezi vian peton pri la argentiniaj adresoj, ĉar ni tute perdis kontakton kun k-doj. el la urbo kiun vi indikas Krom tio, ni ne havas aliajn taŭgajn adresojn. Tutkoran saluton!

**Eldonkvanto de ĉi tiu numero: 5300 ekzempleroj**

## KORESPONDADO

**Simpla trilinia anonceto 4 f. fr.**

SOVETIO.—K-dino. Lisikova Viveja—ul. Sredne Moskovskaja 90 — VORONEĴO (U. R. S. S.) dez. interŝanĝi P. K., P. M., bildetojn, plakatojn, k. t. p.

FRANCIO.—Komunista Ĉelo — 51 Avenue des Tilleus—BURES s/IVETTE (Francio) dez. kor. kun hispanaj batalantoj, per kolektivaj leteroj.

SOVETIO.—K-do. P. Domraĉev St. Tuŝino Kluzo 8 — MOSKVO (U. R. S. S.) dez. kor. pri kontraŭfaŝista lukto kun hispan-in-oj k kun ĉ. 1. antifaŝistoj p. ĉ. t. La anonco validas dum tuta jaro.

## INFORMEJO

### ONI SCIVOLAS PRI:

K-doj. L. Marcel Lombard k S. Weerdenburg kiuj loĝis en ALBACETE, Altozano S. R. I. 580 C-1.

K-do.—Francisco Ramirez, kies lasta adreso estis: Grupo Transmisiones.—AZUARA (Zaragozo).

K-do. Salvador Maurel, kiu loĝas aŭ loĝis en strato Taquigrafo Garriga 112°, Les Corts, Barcelono k estis membro de la Esp. grupo «Barcelona Stelo».

### ONI INFORMAS, KE

La nova adreso de K-do. Rafael Palomares estas jena: 14 Batallón de Retaguardia, Habilitado, Castellón (Hispanio).

Presejo de J. Olmos, Alicante, 55, Valencia

## NIA MUNICIO

| | | |
|---|---|---|
| Valencia esperantistaro | 121'50 | ptoj. |
| J. S.—S. Clemente | 4 | » |
| J. G.—Torrebaja | 5 | » |
| J. R.—Puigcerdá | 10 | » |
| M. C. Borjas Blancas | 5 | » |
| D. M.—Villarreal | 5 | » |
| P. S.—Orihuela | 10 | » |
| F. D.—Madrigueras | 20 | » |
| D. K. Benicasim | 10 | » |
| F. R.—Pozoblanco | 5 | » |
| S. V.—Villanueva de Cordoba | 25 | » |
| M.—Ciudad Lineal | 10 | » |
| J. B.—Cartagena | 15 | » |
| R. E.—Centra Fronto | 10 | » |
| J. M. B.—Alfambra | 20 | » |
| J. T.—Casas Ibañez | 6 | » |
| A. E. H.—Northampton | 5 | ŝil. |
| J. W. H.—Capilano | 12 | » |
| E. M.—Ilford | 5 | » |
| E. A.—Folkestone | 1 | » |
| W. B. M.—Cowdenbeath | 1 | » |
| Taksiista Esp. Grupo.—Londono | 6 | » |
| V. V.—Londono | 2'6 | » |
| F. J.—Karlskoga | 5 | sv.kr. |
| A. G.—Traneberg | 9'15 | » |
| G. M. B.—Kiruna | 12 | » |
| Lab. Esp. Grupo.-Göteborg | 22 | » |
| Y. A.—Vannas | 5 | » |
| H. Y.—Boras | 2'32 | » |
| T. A.—Stockholm | 10 | » |
| H. R.—Varberg | 1 | » |
| V. J.—Enskede | 5 | » |
| J. E.—Falun | 5 | » |
| A. R.—Falun | 5 | » |
| A. J.—Visby | 5 | » |
| J. K.—Nikoping | 2 | » |
| E. B.—Fyrunga | 5 | » |
| G. E.—Leksand | 2 | » |
| Lab. Esp. Klupo.—Karlstad | 5 | » |
| Lab. Esp. Klubo.—Malmo | 10'50 | » |
| Esp. Klubo. «La Ondo».—Nya Varvet | 8'50 | » |
| J. M.—Issy les Moulineaux | 20 | ffr. |
| Monkolekto en Ĉeĥoslovaka Esp. Asocio.—Aussig | 140 | » |
| Ned. Instruisto.-Kalundborg | 45'60 | » |
| L. P.—Toulon | 50 | » |
| G. Montpellier | 20 | » |
| G. T.—Raasiku | 78'74 | » |
| Groupe Esp. Ouvrier.—Orleans | 6 | » |
| A. C.—Malo les Bains | 20 | » |
| J. E.—Rognac | 20 | » |
| G. T.—Paris | 20 | » |
| O. H.—St. Denis de Vaux | 10 | » |
| E. J. Boisguillaume | 65 | » |
| Groupe Esp. Prolet.—Toulouse | 25 | » |
| Komunista Ĉelo.—Bures s/ Ivette | 20 | » |
| B. B.—Macon | 10 | » |
| M.—Pont Auderner | 20 | » |
| B.—Orleans | 50 | » |
| B.—Orleans | 15 | » |
| P. M.—Orleans | 1 | » |
| H. B.—Annecy | 13'50 | » |
| P. Th.—Vaulx en Velin | 10 | » |
| N.—Saigon | 7'65 | » |
| J. P.—Rotterdam | 1'25 | gd. |
| D. K. FLE Sekcio X.—Amsterdam | 2'10 | » |
| Y. K.—Utrecht | 0'25 | » |
| A. R.—Zeist | 2 | » |
| D. S. V.—Arnhem | 2'50 | » |
| De J.—Amsterdam | 1 | » |
| W. Z. L.—Eindhoven | 1 | » |
| Listoj L. V.—N.° 8 D. C.—Imuiden | 5'30 | » |
| Listoj L. V.—N.° 5 v. d. C.—Haarlem | 3'05 | » |
| Listoj L. V.—N.° 1 K.—Beverwijk | 1'60 | » |
| Listoj L. V.-N.° 9 -Haarlem | 0'90 | » |
| J. J. J. V.—Amsterdam | 3 | » |
| Monkolekto H. J. N.-den Haag | 26'60 | » |
| H. Amsterdam | 0'70 | » |
| G.—Amsterdam | 0'25 | » |
| G. J. v. W.—St. Adeurode | 0'60 | » |
| FLE Sekcio I.—Amsterdam | 1'65 | » |
| FLE Sekcio.—Wormerveer | 2'35 | » |